Hallo, da mein Esperanto noch sehr dürftig ist, schreibe ich auf Deutsch. Euren Artikel zu Riismo im Kune fand ich sehr interessant, ich hatte zuvor noch nie von dieser Möglichkeit gehört. Ich finde das Thema sehr wichtig, die Umsetzung sehr einfach und praktikabel und würde mir wünschen, dass sich Ri als Pronomen durchsetzt

sowie -iĉ- als Spiegelbild zu -in-. Wie wunderbar einfach geschlechtergerechte Sprache doch sein kann! Diese Chance darf Esperanto sich nicht entgehen lassen. Gruß, Martin

Martin Kutzner

Saluton, havu jen mian opinion pri riismo kaj rilataj temoj. Ja estas bona ideo plibonigi nian lingvon. Tamen oni ne baru al si la vojon al taŭga futuro.

Enkonduki novajn sufiksojn, neologismojn ktp, kiuj portas ĉapelitajn literojn,

estas dekomence due plej bona solvo. Estas apenaŭ imageble, ke la UN, la EU aŭ aliaj similaj internaciaj organizaĵoj, se iam entute, akceptos internacian neŭtralan lingvon kun alfabeto pli komplika ol la angla.

Eĉ se inter la nun ekzistantaj-uzataj oficialaj laborlingvoj de ĉi organizaĵoj estas etnaj lingvoj kun supersignoj, tio ja ne signifas, ke oni laŭ simpla racieco ne rezignu pri diakritsignaj alfabetoj, se oni fine decidas havi duan lingvon por ĉiuj.

La Nova Helpalfabeto (NHA) aŭ RALFo (Racia Alfabeto) intertempe prezentas taŭgan alternativon, kiu konsekvence modernigas la Esperantan alfabeton. Ankaŭ la uzado den „na“ kaj „den“ estas bonaj pliampleksigo den la lingvaj resursoj en nia komuna lingvo. Oni ankaŭ ne forgesu, ke Zamenhof mem en sia Lingvaj Respondoj jam dubis pri la fina taŭgeco de la „alfabeta diakriteco“ (vd. §§ 58).

Estas ja verŝajne, ke iom inerta ĉi-rilata agado de la Akademio, iom inerta konservativismo en la Movado kaj iom troa konfido al la ĉiopotenco de la elektronika maŝinaro kondukas al nenecesa barado de la propra vojo. Krom la ideo malforteco de la organizita kaj organizanta esperantismo (ekz. manko de enstatutiigita ekologie daŭripova bazo de la propra laboro) ĉi neprogreseco fine malhelpas nepotaŭgan persepektivon de la Movado.

Wolfgang Günther



Esperanto-Tago en Benino

Afrika Centro Mondcivitana (ACM) organizis diversajn aktivajn por festi la Esperanto-Tagon la 26-an de julio, en Lokossa, sed fakte la beninanoj komencis agi iom anticipe. Granda sukceso, ĉefe ĉe la infanoj, estis la piedpilka turniro, kiu partoprenigis 8 teamojn de la urbo, montrante, kiel en Bonaero, ke la sporto estas bona rimedo por diskonigi Esperanton al neesperantistoj. La 12-an de julio okazis la 1-a matĉo kaj la turniro daŭris 2 semajnojn. La partoprenantoj ekkonis Esperanton per prelegoj kaj disdonado de esperantaĵoj kaj informiloj en la franca lingvo. Instigo al lernado ne mankis per propono de senpaga kurso. François Hounsounou en intervjuo donita al loka radiostacio parolis pri la signifo de la Esperanto-Tago, rilate justan komunikadon en la mondo. Tiun intervjuon oni dissendis plurokaze dum tri tagoj.

(François Hounsounou, *Esperanto*, Novembro 2014)

Bildstrio pri Esperanto aperis en la angla

La usona bildstria desegnisto Dan Mazur publikigis 12-paĝan dokumentan komikson pri denaskaj parolantoj de Esperanto. La bildstrio aperis kiel parto de komiksa antologio pri la temo „subkulturoj“. *Libera Folio* faris intervjuon kun la aŭtoro; ĝi estas atingebla interrete, same kiel unu paĝo de la bildstrio.

(www.liberafolio.org)

Belartaj konkursoj de UEA en 2015

La gvida Esperanta artkonkurso, la Belartaj Konkursoj de UEA, invitas partoprenantojn por la 66-a fojo. La rezultojn oni anoncos en la 100-a Universala Kongreso en Lillo. Partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al partopreno en la UK, nek al membreco en UEA. La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, escepte de la branĉo Infanlibroj. Oni rajtas sendi maksimume 3 konkursaĵojn por sama branĉo. Detala regularo haveblas ĉe UEA, kaj legeblas ankaŭ ĉe

http://uea.org/dokumentoj/belartaj_konkursoj_regularo.html

Esperanto kiel Pola Nemateria Kultura Heredaĵo

La pola esperantisto Kazimierz Krzyżak atingis per sia kunlaboro kun parlamentanoj de la Parlamenta Grupo Subtenanta Esperanton, inter ili la pola senatano Edmund Wittbrodt, kaj Pola Instituto de Nacia Kultura Heredaĵo, helpate de landaj kaj eksterlandaj subtenantoj, la honoron ricevi aproban subskribon de la pola Ministro pri Kulturo kaj Nacia Heredaĵo, loki Esperanton sur la Polan Liston de

Nemateria Kultura Heredaĵo. La 20-an de novembro prof. Małgorzata Omilanowska, la pola ministro pri kulturo kaj nacia heredaĵo, aprobis lokigon de la lingvo Esperanto sur la „Polan liston de nemateria kultura heredaĵo“. Per tio estonte eblos proponi Esperanton kiel Nematerian Kulturajn Heredaĵojn de la Homaro, kadre de Unesko.

(Edward Jaśkiewicz, Pollando kaj www.eventoj.hu).

Renovigita retejo de UEA ekfunkciis

La reta reprezentejo de UEA ricevis renovigon. Temas ankoraŭ pri evolua kaj enhave ne revolucia ŝanĝo. La retejo iĝis pli facile uzebla kaj pli facile administrebla, sed la klopodoj fari ĝin pli belaspekta ankoraŭ daŭras, same kiel la finfarado kaj transigado de informoj de kelkaj partoj de la malnova retejo, kiu restos provizore atingebla ĉe aparta adreso. La nova retejo transprenis la funkciojn de la reta Jarlibro, escepte de kelkaj malgrandaj funkcioj, pro kio ankaŭ tiu subretejo plu restas atingebla. Por posta tempo restas la renovigo de la reta Katalogo, kiu estas daŭre atingebla ĉe sia propra adreso. La renovigo de la retejo estas certgrade teknika kaj efektivigita rezulte de la kelkjaraj laboroj de unu volontulo, Andrej Grigorjevskij. Longperspektive estas planata pli drasta kaj profesia renovigo, por kiu estas rezervita mono el la kapitalo de UEA.

(www.uea.org)

Esperanta klavaro por iPhone

En telefonoj kaj tabulkomputiloj, kiuj uzas la operacian sistemon Android, jam de multaj jaroj eblas facile tajpi Esperante en ĉiuj programoj. Por uzantoj de la produktoj de Apple la situacio ĝis nun estis malpli bona: ekzistis diversaj surogataj manieroj enigi Esperantajn literojn, sed tiuj ĉiam postulis kopiadon kaj engluadon de teksto. Ne ekzistis maniero instali klavaron por rekte enigi literojn ne aprobitajn de Apple. La problemo trafis ne nur esperantistojn, sed ankaŭ uzantojn de aliaj lingvoj, kiujn Apple mem ne provizis per preta klavar-aranĝo. Nun la afero tamen ŝanĝiĝis. Ekzistas nova klavaro, kreita de Chuck Smith, kaj ekde januaro ĝi estas havebla por la ĝenerala publiko ĉe Apple App Store.

(www.liberafolio.org).

Mireille Grosjean: la Esperantisto de la Jaro 2014

La internacia magazino *La Ondo de Esperanto* en 1998 iniciatis ĉiujaran proklamon de la Esperantisto de la Jaro. Al la projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj. Kiel la unua laŭreato en 1998 estis elektita William Auld. La

Svisa emerita instruistino Mireille Grosjean, prezidantino de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) estas proklamita la Esperantisto de la jaro 2014 pro la sukcesa agado en Afriko, interalie pro la organizo de la 5-a Afrika Esperanto-Kongreso; pro la aktiva laboro en ILEI, kies 47an internacian konferencon en Montevideo ŝi gvidis en julio 2014; kaj pro la preparado de la Tria Tutmonda Kolokvo pri Instruado de Esperanto okazonta en 2015.

(<http://sezonoj.ru/2014/12/grosjean/>)

Rekorda KAEST

Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST) okazis novembre en la slovakia urbo Modra-Harmónia. Ĝia ĉeftemo estis „Arkivoj kaj bibliotekoj – kiel protekti kaj konservi nian heredaĵon“. Krome eblis partopreni ankaŭ AMO-seminaron (Aktivula Maturiĝo), kies ĉefa temo estis „Ciferecigo de la Esperanto-kulturo“. Tiu ĉi KAEST estis rekorda, se temas pri nombro de partoprenantoj, ĉar aliĝis 77 personoj. Inter la prelegantoj estis ekz. Marek Blahuš pri ciferecigo de la Zamenhofaj adresaroj; Ján Vajs pri slovakaj grotsistemoj; Vit Guglielmo Mišurec pri kemio en manĝaĵo; Mélanie Maradan pri optika signorekono; Konstantin Tiĥomirov pri transliterumo kaj latinigo de la rusa lingvo; Hans Michael Maitzen, Bernhard Tuider kaj aliaj. Cetere Peter Baláz prezentis la duan eldonon de la unua Esperanto-lernolibro pri Tokipono. Petr Chrdle prezentis novajn librojn de sia eldonejo KAVA-PECH. Menciindas iniciato de hungaraj esperantistoj sub la gvido de László Szilvási, kiuj en KAEST lanĉis la arkivon de 40 ciferecigitaj jarkolektoj de Juna Amiko por 1974-2014. Dum la aranĝo estis transdonita al Stano Marček la premio Deguĉi pro liaj meritoj, ekz. lia lernolibro *Esperanto per Rekta Metodo*, kiu ĝis nun aperis en 34 diversaj lingvoj. (Diversaj retfontoj, i.a. <http://sezonoj.ru/2014/12/slovakio-5/> kaj la filmo sur

<https://www.youtube.com/watch?v=YqOJRjOflek>

TEJO kaj eksteraj rilatoj

Post la eniro de TEJO en la ĉefan plenumorganon de IKRIO (Internacia Kunordiga Renkontiĝo de Junularaj Organizoj – <http://icmyo.org/>), estas nun la vico de laboro sur la eŭropa nivelo. La Ĝenerala Asembleo de la Forumo Junulara Europa (FoJE), okazinta en Kluĵo (Cluj-Napoca, Rumanio) akceptis amendon de TEJO por okazigo de siaj kampanjoj en pluraj lingvoj, kaj ne nur en la angla, kiel okazis ĝis nun. Tiu ĉi sukceso des pli valoras, ĉar la estraro de FoJE donis sian kontraŭan opinion antaŭ la voĉdono. Tre helpis daŭra retumado kaj kontaktado kun aliaj organizoj, kiujn elstare entreprenis la TEJO-reprezentantoj Michael Boris Mandirola kaj Veronika

Poór. La asembleo ankaŭ aprobis la novan kondukt-kodon de FoJE, kiu aparte inkluzivas kontraŭon al la lingva diskriminacio. Plia novaĵo estas la elekto de Michael Boris Mandirola en CBMA (Consultative Body on Membership Applications – Konsult-Konsilio pri Membraj Aliĝpetoj) de Forumo Junulara Eŭropa. La konsilio, en kiu membras du reprezentantoj el Naciaj Junularaj Konsilioj kaj du el Internaciaj Junularaj Neregistaraj Organizoj, havas la taskon trakti la membriĝpetojn de novaj organizoj, la petojn pri statusŝanĝoj de la nunaj membroj kaj ĝiajn membrec-reviziadojn por verki rekomendojn al la membrokonsilio. Plia atesto pri la rekonon de TEJO kiel serioza partnero kaj agadoriĉa organizo, fidinda kaj kunlabora. Tiu ĉi sukceso sekvas multjaran laboron de TEJO en la kampo de eksteraj rilatoj kaj en multjara aktiva partopreno en la plej diversaj agadoj de FoJE, de la Ĝenerala Asembleo ĝis la laborplanaj diskutoj, de la renkontiĝoj pri junulara laboro ĝis la internacia kunlaboro kun Ĉinio kaj Afriko, kaj en multaj aliaj. Se la leganto volas finance subteni la agadon de TEJO pri eksteraj rilatoj, bv. konsideri donaci pere de UEA kun la priskribo: „TEJO-KER“. Pagmanieroj estas priskribitaj ĉe http://uea.org/alighoj/pag_manieroj.html (TEJO-aktuale)

Kolektis kaj prilaboris Uwe Stecher

5a Esperantista Migrado Aŭtuna: la aliĝilo pretas

Intertempe retpaĝo pri la 5a EMA, Esperantista Migrado Aŭtuna, pretas kaj alireblas per www.esperanto.de/ema. Tie troveblas reta aliĝilo. Papera aliĝilo ekzistas ankaŭ, kaj estas havebla ĉe la du organizantoj: Wolfgang Bohr <wolfgang.bohr@esperanto.de> aŭ Rudolf Fischer <fischru@uni-muenster.de>

La 5a EMA okazos de la 18a ĝis la 23a de oktobro ĉe la rivereto Ahr, tranoktejo estos la junulargastejo de Altenahr. Ĉiuj ĉambroj kun duŝo kaj necesejo. Partoprenkotizo ĝis la 31a de marto estas 270 EUR en 2-lita ĉambro. Ordinaraĵ GEA-membroj kaj eksterlandanoj ricevas rabaton de 30 EUR. Krompago por 1-lita ĉambro: 30 EUR.

Se vi ne uzas la retan aliĝilon: Aliĝojn kolektas Rudolf Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a, 48356 Nordwalde aŭ retpoŝte.

Atentu: nova konto de EMA estas Deutscher Esperanto-Bund, IBAN DE32 5085 1952 0040 1145 71, Sparkasse Odenwaldkreis, BIC HELADEF1ERB

La jaron 2015 enkondukis la jam 6-a Junulara Esperanto-Semajno,



dum kiu ni kunvenis en Weißwasser, Germanio

Karaj legantoj,

jam preskaŭ finiĝis la jaro 2014. Ankaŭ alproksimiĝas jen nova jaro – ĝin enkondukis la jam 6-a Junulara Esperanto-Semajno, dum kiu ni kunvenis in Weißwasser, Germanio. Ni deziras do al vi ĝojan, prosperan, esperantoverdan jaron

2015! Pleje, kompreneble, ni esperas, ke vi ĝuu la legadon de via **•kune•**. Ĉi-foje vi trovos en ĝi ekzemple iomete da antaŭrigardo al la komenciĝinta jaro. Ke vian intereson forte veku ĉi nova eldono, deziras

Via redakcio

Timo, Jarno kaj Annika

JES - ein Ausblick

Vor einigen Jahren beschlossen die Vorstände von deutscher und polnischer Esperanto-Jugend, statt zweier gleichzeitig stattfindender Silvestertreffen ein gemeinsames zu veranstalten: Das JES war geboren.

Seit dieser Zeit funktionierte die Zusammenarbeit bei der Organisation des JES zwischen DEJ und PEJ mal besser, mal schlechter. Mitte 2014 nun schlug die PEJ vor, das JES nicht mehr nur in Polen und Deutschland, sondern 2015 zum ersten mal in einem anderen Land, nämlich in Ungarn stattfinden zu lassen.

Von diesem Vorschlag wurden wir als DEJ-Vorstand zunächst einmal ziemlich überrumpelt. Für uns bedeutete das ein klarer Bruch mit dem JES-Konzept, wie es von uns verstanden wurde.

In den vielen Gesprächen, die wir mit dem PEJ-Vorstand darüber geführt haben wurde dann deutlich, dass es in beiden Vereinen offenbar ganz unterschiedliche Ansichten und Vorstellungen über das generelle Konzept des JES als solches gibt. Wir, der Vorstand der DEJ, wünschen uns das JES weiterhin als internationales Jugendtreffen, gemeinsam organisiert von DEJ und PEJ, während die PEJ durchaus auch andere Organisationen einbinden und das JES in ganz Europa herumreisen lassen möchte.

Diese grundlegenden Konzeptionsnichtübereinstimmungen haben uns dazu bewogen, das JES 2015, das in Ungarn stattfinden soll, als DEJ nicht mitzuorganisieren. Das bedeutet natürlich nicht, dass unseren Mitgliedern nicht freigestellt ist, im Organisationsteam mitzuarbeiten, wenn sie dies möchten. Auch wird es vermutlich wieder Fahrtkostenzuschüsse für die Anreise geben.

Nun stellt sich die Frage, was mit dem JES 2016 passiert, das ja turnusgemäß wieder in Deutschland stattfinden soll. Und, wie es grundsätzlich mit einem Treffen der DEJ weitergehen soll.

Auf der Jahreshauptversammlung wurde beschlossen, dass das nächste halbe Jahr zunächst vereinsintern zur Information und Diskussion über das Thema genutzt werden soll und auf der Jahreshauptversammlung 2015, die auf dem IJK stattfindet, über diese grundsätzliche Frage, wie aus Sicht der DEJ-Mitglieder mit dem JES weiter verfahren werden soll, abgestimmt wird.

Aus diesem Grund wird sich die nächste Ausgabe der **•kune•** nur mit dem JES befassen. Wenn du etwas dazu loswerden möchtest, Fragen oder Ideen hast, schreibe an kune@esperanto.de!

Die Jahreshauptversammlung – was ist passiert?

Vorstandswahlen

Der Vorstand wurde komplett neu gewählt und besteht nun aus: Annika Förster (Vorsitzende), Jarno Riefer (Kassenwart und stellvertretender Vorsitzender), Paul Würtz und Julia Berndt.

Satzungsneufassung

Wie in der letzten **•kune•** angekündigt, wurde die Satzung auf der Jahreshauptversammlung neu beschlossen. Die neue Fassung findet ihr demnächst auf der Homepage.

Finanz- und Beitragsordnung

Passend zur Satzung haben wir auch eine Finanz- und Beitragsordnung beschlossen, die die Satzung um alles Finanzielle erleichtert.

Wichtig ist hierbei vor allem, dass die Mitgliedsbeiträge in jeder Kategorie um 10€ erhöht wurden. Mitglieder unter 16 Jahren zahlen nun 20€, Mitglieder über 16 Jahren ohne eigenes Einkommen 30€ und mit eigenem Einkommen 50€ pro Jahr. An dieser Stelle sei daran erinnert, dass diejenigen unter euch, deren Beiträge nicht eingezogen werden, diese bitte überweisen mögen.

Nächste Jahreshauptversammlung

Die nächste Jahreshauptversammlung wird auf dem IJK in Wiesbaden stattfinden, das genaue Datum wird euch rechtzeitig mitgeteilt werden.

Wenn ihr es noch genauer wissen möchtest, was passiert ist, schreibt einfach eine E-Mail an kune@esperanto.de und ihr bekommt das Protokoll der Jahreshauptversammlung zugesandt.

Karaj junaj amikoj!

Unue estu dirite, ke mi admiras ĉiun junan homon, kiu en tiu ĉi preskaŭ jam komplete usonigita mondo – mi ŝatas Usonon esti usona, sed Germanion germana, Francion franca, Aŭstrion aŭstra, Slovenion slovena ktp – sub la regado de Basic English, ne la angla de Shakespeare aŭ de King James Bible, kiu fakte fariĝis la tutmonda lingvo (tamen ne la internacia), decidis dediĉi sian tempon kaj energion por la afero, kiun la mondo de ĉiuaspekta potenco priridas kaj principe malakceptas. Tio faras vin originalaj, kuraĝaj, justece kaj racie interesitaj kaj perspektivvidaj.

Sed, kial difekti unu el tiuj belaj trajtoj jam tujdekomence per epigona parafrizado kaj parodiado el la enkonduka alineo al la Manifesto de komunistoj fare de Karlo Marx kaj Frederiko Engels? Mi kredas, ke junaj homoj kiel vi havas en sia menso kaj talentaro sufiĉan kapaciton por elpaŝi en la publikan mondon originale kaj ne per la jam delonge trivita kaj morale tiel katastrofa materialo, kian tiu ĉi teksto el la unua duono de la 19-a jarcento prezentas.

Tamen per la cetera bona tendenco esti originala oni ne devas troigi. Tiel ekzemple la troigado esti je ĉiu prezo kaj kontraŭ ĉia racio „originala” trovis sian bildon ankaŭ en niaj lingvoj per la sintagmo „ne inventi denove la radon”. Bedaŭrinde ankaŭ en la historio de Esperanto – se iu socia fenomeno kontinue daŭras pli ol 100 jarojn, oni jam prave povas paroli pri historio – fantomas provoj, inventi radon ĉu gramatike, ĉu leksike, ĉu ortografie, ĉu stiluze. Fariĝis preskaŭ parto de esperantopopola folkloro, tuj post la duonsukcese farita ekzameno A proponi certajn lingvajn reformojn en la verko de d-ro Zamenhof. Tiam nove inventitan „radon” mi trovas ankaŭ en via prezento de „riismo” en la senco de la genra ideologio, kiu minacas la racian kaj spiritan ne nur de la lingvo internacia, sed ankaŭ de niaj naciaj lingvoj kaj tiel ankaŭ de la popola menso, kiu averaĝe ne posedas sufiĉan scion kaj instruitecon por povi demaski la stultajojn, kaŝitaj sub la ŝajnhavto de la justeco, koncernanta rilatojn inter ambaŭ seksoj.

Solvi la problemaron inter viro kaj virino per „revolucio” aŭ eĉ nur „reformo” en gramatiko kaj leksiko, estus por Marx kaj restas por ni nuntempe simple tro malmultekosta provo reglementi la interhomajn rilatojn, speciale tiujn, kondiĉitaj de onia sekse diferenco, absurda afero. Se mi utiligas la pensajn kategoriojn de Markso, mi povus diri: Same, kiel la sklavo ne ĉesas esti sklavo, se oni lin ĉu revolucie, ĉu reforme, nomas servutulo, laboristo, dungito... ankaŭ virino ne ĉesas esti tiel ofte ekspluatata, maldece kaj brutale traktata, antaŭ la leĝo ne same valida, se oni anstataŭ per ŝi alparolas ŝin same kiel viron, „neŭtrale” per ri!

Kaj nun pri la „invento de rado” en tiu ĉi ideo... La genre neŭtrala formo en Esperanto jam tujdekomence ekzistas kaj por beboj same kiel por animaloj regule uziga. Temas pri la tria persono ĝi, kiu staras por objektoj, fenomenoj, vivaj estaĵoj kaj homaj beboj. Ĝi ne enhavas indikon pri la sekse aparteno, do ĝi estas tute sekse neŭtrala; la adeptoj de la genra ideologio povas tion uzi sen interveno en la Fundamenton. Apud la sekse

neŭtrala pronomo ĝi Esperanto havas aldonan same neŭtralan formon oni en la senco de la germana „man”, kiun oni povas uzi, se temas pri nedifinitaj personoj – kaj la moderaĵ genristoj-riistoj pliparte zorgigas ĝuste pri tia kazo.

Mi supozas, ke vi kontraŭstaros la uzon de ĝi por indiki seksan neŭtralecon per argumento, ke la plenkreska homo tamen nek estas plu bebo nek besto aŭ planto aŭ morta objekto. Skize dirite, subite vi forgesas pri la plej alta leĝo de la genrismo-riismo: la neŭtraleco. Se la neŭtraleco estas ultima ratio, la plej alta saĝo de via movado, bonvolu do esti per tio konsekvenca. Ne estu partieca inter bebo kaj oldulo, sub la principo de absoluta neŭtraleco ili ambaŭ estas ĉiu por si kaj ambaŭ inter si neŭtralaj objektoj! Ne estu partieca inter morta objekto, planto, besto kaj homo, ja sub la principo de absoluta neŭtraleco ili ĉiu/ĉio por si estas la samo, kaj inter si ili ĉiuj estas la samo. Do ankaŭ en la tabelo de korelativoj oni devus inventi genrolingvan „radon” por ne esti partieca ĉu objekte, ĉu animale, ĉu home.

Ĉu Esperanto vere estas neŭtrala lingvo? Jes, sed nur en kelkaj aspektoj, neniel absolute. Esperanto antaŭ ĉio estas kaj devas esti neŭtrala, por harmonii kun la senco de sia estiĝo kaj misio, inter la gentoj, nacioj kaj ŝtatoj. Tio ĉi estas la origina, zamenhofeska neŭtraleco de la Lingvo Internacia, kiel Esperanto origine nomiĝis. Sed neniuj esperantisto, komence kun Zamenhof, venis al ideo malpermesi nomi la gentojn, la naciojn kaj la ŝtatojn por esti tiel strikte neŭtrala, kio farus la analogion kun la postulo de la genro-riismo, kiu volas forigi la indikojn pri io tiel reala, kiel la sekse diferenco estas. Neŭtraleco ne signifas prisilenti la realon kaj ĝiajn diferencojn, sed signifas samrajte, do juste trakti la portantojn de tiaj diferencoj, kiel sekso, aĝo, nacieco, religio, mondpercepto ktp.

Mi deziras al vi, Timo, Jarno kaj Annika, insiston en la particeco flanke de la bono kaj justo kaj neŭtralecon flanke de la komunika instrumento tion mesaĝi kaj praktiki – kaj salutas bondezire en la jaro 2015 –

Vinko Ošlak

•kune• estas la komuna membrogazeto de la Germana kaj de la Aŭstria Esperanto-Junularo (GEJ kaj AEJ). Ekde 2011 ĝi aperas kiel interna revueto de *Esperanto aktuell*.

Korespond-adreso: c/o Deutsche Esperantojugend, Katzbachstraße 25, 10965 Berlin.

Retpoŝto: kune@esperanto.de

TTT: <http://www.esperanto.de/kune>

Estraro de GEJ:

Prezidanto: Annika Förster

Pliaj estraranoj: Jarno Riefer (Kassenwart, stellv. Vorsitzender), Paul Würtz, Julia Berndt.

Adreso de GEJ:

Deutsche Esperanto-Jugend e.V.

Katzbachstraße 25, 10965 Berlin, Germanio.

Tel.: +49 30 42857899, **Retpoŝto:** dej@esperanto.de

TTT: <http://esperanto.de/dej>

Zamenhoffest der bayerischen Esperantisten

Zum alljährlichen vorweihnachtlichen Beisammensein trafen sich die Esperantosprecher Bayerns 2014 bereits am 29.11. 2014 in Regensburg.

Uli Ender hatte hierzu eingeladen, und für ihn war die Veranstaltung zugleich eine Art Abschiedsfeier von der oberpfälzischen Stadt, die er aus beruflichen Gründen demnächst verlassen wird. Rund 30 Esperantisten folgten der Einladung und trafen sich im Kolpinghaus St. Erhard.

Auf dem Programm standen zunächst mehrere Kurzvorträge: Alfred Schubert berichtete in einem Lichtbildvortrag über das Esperanto-Kulturhaus Schloss Gréssillon, das vielen bekannt ist, aber auch unbekannte Seiten hat; Norbert Gütter trug Verse des Mundartdichters Michl Ehbauer vor, der in seinen Werken auch schon

mal Esperanto mit Bairisch vermischt hat; Bernd Krause präsentierte eine Broschüre, in der Quellenmaterial zur Historie und einst blühenden Präsenz des Esperanto in Regensburg für die Zeit zwischen 1908 und 1936 zusammengestellt ist (s.u.); Gastgeber Uli Ender selbst zeigte und kommentierte Ausschnitte aus einem Film, in dem über seinen bisherigen Arbeitsplatz, die Infineon AG, berichtet wird.

Höhepunkt der Veranstaltung war eine Stadtrundfahrt, in deren Verlauf die wichtigsten Plätze der Geschichte und Gegenwart Regensburgs angeschaut werden konnten. Im Anschluss daran waren zwei weitere Beiträge zu vernehmen: Josef Lechermeier beschwor die ach so „stille“ Adventszeit, und Uli Enders trug (anstelle von Evelin Geist, die nicht anwesend sein konnte) die Geschichte vom „Nürnberger Rauschgoldengel“ vor.

Dank der hervorragenden Vorbereitung und Durchführung des Tages wurde die Veranstaltung zu einem rundum gelungenen Beisammensein. Uli, wir danken Dir sehr!

Bei der genannten Broschüre handelt es sich um:

Esperanto en Regensburg / Ratisbono = Esperanto in Regensburg. Legaĵoj = Lesematerialien, zusammengestellt anlässlich des Zamenhoffestes der bayerischen Esperantisten 2014 in Regensburg aus dem Germana Esperantisto zusammengestellt von Bernd Krause, Regensburg u. Forchheim 2014 (Privatdruck)

Das rund 20 Seiten umfassende Heft kann gegen eine Schutzgebühr von 4,- EUR beim Herausgeber erworben werden. Kontakt: Dr. Bernd Krause, 09191 – 733 63 83, esperanto@geschichtswissenschaften.com

Dr. Bernd Krause



**Bildunterschrift:
Die Teilnehmer
des bayerischen
Zamenhoffestes vor
dem Südportal des
Regensburger Doms
(Foto: Alfred
Schubert)**

Nia amiko Dieter Hartig foriris

Kun granda danko por tio kion li entuziasme faris por la Bremena Esperanto-grupo kaj entute por la Esperanto-movado (ekz. por la fervojistoj) ni funebras pro la forpaso de Dieter Hartig. Ni kore kondolencas al lia edzino kaj al la familio. Membroj de la iama Esperanto-Grupo Bremen.

Fervojistoj estas vojaĝemaj kaj kontaktemaj, kaj pro la translimaj rilatoj, kiujn postulas kaj ebligas la fervoja trafiko, ili pli insiste spertas lingvajn limojn.

Tiuj povus esti argumentoj por konvinki fervojistojn pri la utilo de la Internacio Lingvo. Demandite pri kio lin allogis, Dieter Hartig nur levis la ŝultrojn kaj citis la sloganon de IFEF, la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio: „La reloj ligas la landojn – Esperanto la popolojn“. Tio ne esence helpis al mi, sed substrekiis, ke fervoja esperantisteco por li estis memkomprenebla afero.

Dieter apartenis al la generacio, kiu mem ankoraŭ devis sperti la militon, komencis sian profesion laboron kaj fondis sian familion en detruita Bremen. Eble tio estis la vera kaŭzo per Esperanto serĉi internacian amikaron.

1968 kiel lokomotivo-kondukisto, fiera patro de du infanoj kaj posedanto de 24 ĉevalpova VW-skarabo - tiel Dieter raportis en sia familia kroniko - li en publika biblioteko hazarde tenis Esperanto-lernolibron en la mano kaj tuj surloke eklernis. Kurso ĉe fervoja faklernejo kaj korespondo inter fervojaj gekolegoj firmigis la entuziasmon kaj instigis ankaŭ la edzinon Lisa lerni la lingvon. En printempo 1971 la paro partoprenis sian unuan internacian kongreson,

la 23-an Internacian Fervojistan Kongreson en Maribor. Tiu aranĝo estis komenco por vivodaŭra enradikiĝo en la movado de la Esperanto-Fervojistoj. Jam unu kongreson pli poste Dieter komencis investi energion kaj organizemon en la terminologian laboron, por kiu IFEF estis establita agadgrupon. Origina bazo kaj referenco de ties aktivecoj estis la *Lexique Général des Termes Ferroviaires*, la terminaro de la Internacia Fervojunio (UIC), en unua eldono aperinta 1957 en ses lingvoj kaj en libroformo. La laboron diktis la rimedo – listoj, kartaroj kaj slipokestoj kaj la ritmo de la renkontiĝoj. Tro ofte perdiĝis la konkuro kun apero de nova „Lexique“-eldono. Por kunordigi la taskojn kaj akceli ilian plenumon specife inter la kongresoj Dieter en 1976 instalas la „Terminaran Kurieron“ (kiu funkcias ĝis hodiaŭ). Esencan parton de la magera libertempo, kiun la skipa laboro permesis, li dediĉis al la terminara misio. Helpe de privata komputilo kaj nadloprintilo, kiujn Dieter aĉetis en 1986, unu jaron post emeritiĝo, kaj „aŭtodidakte majstrita“ programado li kondukis la projekton al sukcesa apero de la *Plena Vortaro de la fervojistoj* samtempe kun la aktualigita (kvara) eldono de la UIC-terminaro. Dank’ al IFEF kaj speciale la hungaraj amikoj la Fervoja Terminaro en Esperanto en 1992 interŝanĝis la suplementan rolon kontraŭ regula loko inter la intertempe dek aliaj lingvoj de la UIC-terminaro.

Dum la 52-a Fervojista Kongreso en Budapeŝto en la jaro 2000 Dieter Hartig 72-jara petis post 109 eldonoj de la *Terminara Kuriero* pri malŝarĝo. Dum jardekoj Dieter kaj Lisa ne maltrafis eĉ unu kongreson. Sed la tedaj sekvoj de aĝo kaj malsano postulis redukti la rapidecon.

La fervojistoj certe estis la ĉefa celgrupo de lia agado. Tamen ankaŭ la „normalaj“ esperantistoj profitis de lia laboremo kaj kreiveco. Per la „Konversacia kurso“ kaj „Esperanto - Eine lebendige Sprache“ li kontribuis al la varieto de la instruaj medioj. En la *Ŝtono de saĝuloj* kaj la *Flugantaj folioj* li publikigis kolekton de glosoj el vivo kaj mondo. Jam en 1971 li aliĝis al la Esperanto-grupo Bremen kaj multajn jarojn en diversaj roloj estis la motoro de la grupo. Inter alie li redaktis 282 eldonojn de la *Informilo*, la grupa bulteno.

Ankaŭ post retiriĝo Dieter atente observis la scenejon kaj signalis tion per kontribuoj kiel la „Vojoj al sukceso“, volumo da sugestoj pri varbado kaj grupa vivo. Esencan rangon por Dieter tamen havis amikecoj, kaj Esperanto por li estis la ŝlosilo.

Li flegis la kontaktojn vojaĝante kaj poste majoritate korespondante pri ĉio ajn kun sia propra humuro trabilanta en la *Flugantaj folioj*: „Hodiaŭ mi rigardis min en spegulo. Mi devas diri: La hodiaŭaj speguloj ne estas tiel bonaj kiel la iamaj“.

Nia amiko Dieter Hartig foriris. Sed ni renkontos kaj salutos lin, kie ajn ni vidos liajn ŝpurojn.

Guido Brandenburg



Dieter kaj Lisa Hartig

Kalendaro

Februaro 2015

13 - 15: 68-a Studsesio en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo, Germanio. Klerigado, lingva perfektigo. Studmodulo pri literaturo kaj tradukado. Inf.: Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, Germanio. Rete: esperanto-zentrum@web.de

14 - 21: 22-a Korusa Semajno ĉe Pireneo - en La Bastide/Hers, Arĝejo, Francio. Ĉiutage: kantado sub gvidado de Zdravka Bojčeva, matenaj Tajči-ekzercoj, turismaj vizitoj, E-lernado, vesperaj ludoj, kulturaj prezentaĵoj, folk-muziko, io pli danke al vi! Du koncertoj je la fino de la semajno. Inf.: Jorgos & C.E.E.A. por Tut-Pirenea Esperanto-Koruso. Tutpeko ĉe Monik' Garrigues, Muelejo, FR-09 600 Limbrassac, Francio. Rete: tutpeko@aliceadsl.fr aŭ esperanto.ariege@free.fr

15: Esperanto-maskerada kompanio en Karnavala Parado en Rijeka, Kroatio. Vi povas aliĝi al la grupo kaj partopreni en la karnavala parado, aŭ esti spektanto de la parado. Inf.: Esperanto Societo Rijeka, Blaža Polića 2, HR-51000 Rijeka, Kroatio. Rete: esperanto.rijeka@ri.htnet.hr

20 - 21: Intensa Esperanto-kurso en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo, Germanio. Intensa semajnfino, lingvokurso ĉefe (sed ne nur) por komencantoj kaj komencintoj, en A1, A2-niveloj, laŭ bezono ankaŭ en aliaj en kunlaboro kun Popolaltlernejo Osterode. Inf.: Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, Germanio. Rete: esperanto-zentrum@web.de

Marto 2015

8 - 15: Mediteranea Esperanto-Semajno, MES-2015 - en restadejo Val d' Esquiere - Les Issambres ĉe la Lazura Marbordo, Francio. Ĉu vi ankoraŭ frostas en via regiono? Tuj venu al la Mediteranea Maro, kie floras mimozoj kaj migdalarboj! Vin atendas amika familia etoso, belegaj pejzaĝoj, bona ripozo kaj lazura maro... - Informoj kaj aliĝoj: Monique Prezioso, 92 allée des Harkis, FR 83700 Saint-Raphaël, Francio, rete: prezmoni@hotmail.com, tel. +33 (0)4 94 83 06 88 - aŭ Christine Graissaguel, kris_grai@hotmail.fr

9 - 13: Intensa tutsemajna Esperanto-kurso en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo, Germanio. Tutsemajna Esperanto-kursaro kaj metodika trejnado en kunlaboro kun Popolaltlernejo (KVHS) Osterode. Agnoskita klerigesio! Inf.: Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, Germanio. Rete: esperanto-zentrum@web.de

13 - 15: Intensa Esperanto-kurso en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo, Germanio. Semajnfina Esperanto-kurso en diversaj niveloj por progresintoj, ĉefe B1-B2-C1.

Inf.: Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, Germanio. Rete: esperanto-zentrum@web.de

14: Literatura Tago ĉe IEI en Hago, Nederlando. Literatura kunveno dum kiu Paul Gubbins, brita esperantisto, ĉefredaktoro de internacia Esperantlingva magazino „Monato“, membro de la Akademio de Esperanto, pritraktos diversajn erojn de prozo, poezio, dramo; i.a. Baghy, Forge, C. Rosetti, R. Rosetti, Auld, Boulton. Inf.: Internacia Esperanto-Instituto rete: iesperanto@versatel.nl

20 - 22: Studsemajnfino en Schoonloo (inter Assen kaj Emmen), Nederlando. Kursoj por pluraj niveloj, kostas 65-75 eŭrojn. Inf.: esperanto-nederland, Kruiszwijn 1205, NL-1788 LE Julianadorp, Nederlando. Rete: studsemajnfino@esperanto-nederland.nl

20 - 22: 7-a BIERo en Pelhřimov, Ĉeĥio. Promenoj, ekskursoj, ludoj.... (Bonvolu ne peti invitleteron.) Inf.: E-mental', rete: [e-mentalprago\(ĉe\)seznam.cz](mailto:e-mentalprago(ĉe)seznam.cz)

27 - 29: Junulara Esperanto-Renkontiĝo, JER - en urbeto Verőce, 50 km norde de Budapeŝto. Tradicia junulara semajnfino, la oficiala renkontiĝo por la jarĉefkunveno de la Hungara Esperanto-Junularo (29-an de marto). Inf.: Magyar Ifjúsági E-Szövetség / Hungara E-Junularo: jer@jer.hu

Aprilo 2015

1 - 7: Internacia Junulara Festivalo (IJF) en Brusson, Aosta Valo, Italio. Unu el la plej amataj kaj atendataj junularaj renkontiĝoj en Eŭropo. Inf.: Itala Esperanto-Junuklaro (IEJ). Rete: ijf.admin@gmail.com

3 - 8: Interkant en Baugé, Francio. Korusrenkonto de la francaj korusoj Interkant kun korsestrinoj Maja kaj Zdravka. inf.: Kastelo Greziljono, MCE Grésillon, St. Martin d'Arcé, FR-49150 Baugé-en-Anjou, Francio. Rete: kastelo@gresillon.org

3 - 10: Printempa Semajno Internacia en Winterberg, Germanio. Printempa kunveno kun ekskursoj, prelegoj kaj kursoj por plenkreskuloj kaj infanoj. Inf.: Germana Esperanto-Asocio, rete: petra.dueckershoff@esperanto.de, tel: +49 (0)151 / 14 43 80 74

8 - 11: Internacia Trejnsesio en Budapeŝto, Hungario. Trejnsesio kun IEI pri strategioj por internacia kunlaboro en la kampo de plenkreskula edukado. Inf.: Kultura Esperanto-Asocio, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapeŝto, Hungario. Rete: oficejo@eventoj.hu

15 - 19: Ekumenaj Bibliaj Tagoj (kun Adoru) en Wrocław, Pollando. Prelegoj pri bibliaj temoj (ĉifoje verŝajne la Apokalipso de Johano) kantoj kaj preĝoj el „Adoru“ (pruntebla), iom da turismo, amikeca internacia kunestado. Inf.: Stefan Lepping, Mellinstr 5, DE-59457 Werl, Germanio. Rete: stefanlepping@gmx.de

17 - 25: 4-a PRINTEMPaS en Baugé, Francio. Intensaj

kursoj kun Zsófia Kóródy el Herzberg, Christophe Chazarein el Okcitanio kaj Jean-Luc Kristos el Aüvernjo. Poste eblas KER-ekzameno. Inf.: Kastelo Greziljono, MCE Grésillon, St. Martin d'Arcé, FR-49150 Baugé-en-Anjou, Francio. Rete: kastelo@gresillon.org

19 - 24: 2a Printempa Migrado en Dijon, Francio. Migrado en Burgundio tra famaj vinplantejoj kaj naturaj medioj ĉirkaŭ Dijono por ĝuemaj esperantistoj! Inf.: Olivier BUISSON, 4, rue Paul Lippe, FR-21000 Dijon, Francio. Rete: obuisson@live.fr

20 - 26: Jindřiška Drahotová en Skokovy Ĉeĥa respubliko. Penziona ESPERO estas en malgranda vilaĝo en Ĉeĥa Paradizo en distrikto Mladá Boleslav. Aranĝas Asocio de Handikapitaj Esperantistoj. Inf.: Jindřiška Drahotová, Sadová 745, Mladá Boleslav CZ-293 01, ĈR. Rete: drahotova@esperanto.cz, tel.: +00-420 720 652 320

24 - 26: KER-ekzamenoj dum PRINTEMPaS en Kastelo Greziljono, Baugé, Francio. Internaciaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1) post intensaj kursoj. Inf.: MCE Grésillon, St. Martin d'Arcé, FR-49150 Baugé-en-Anjou, Francio. Rete: kastelo@gresillon.org

25 - 26: PRINTEMPaS, internaciaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1). Inf.: Inf.: Kastelo Greziljono, MCE Grésillon, St. Martin d'Arcé, FR-49150 Baugé-en-Anjou, Francio. Rete: kastelo@gresillon.org

Majo 2015

13 - 16: Tria Tutmonda Kolokvo pri Instruado de Esperanto en Neuchâtel-La Chaux-de-Fonds, Svislando. Invito iris al ĉiuj ŝtatoj de la mondo. Gravega evento. Inf.: ILEI, pf. 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. Rete: mirejo.mireille@gmail.com

13 - 17: Printempa BARO 2015 (inkl. Ĉieliro, 14. majo) - en Bad Münder, inter Hannover kaj Hameln, Germanio. Multaj venas kun siaj infanoj. Ni babilas, ludas, festas, eluzas la eblojn de la granda herbejo kaj la rivereto kaj faras lignan fajron, <http://www.krokodilo.de/baro/baro.php>

15 - 17: 69-a Studsesio en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo, Germanio. Klerigado, faka trejnado. Studmodulo pri Esperanto-literaturo, movadaj konoj kaj informado, varbado. inf.: Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, Germanio. Rete: esperanto-zentrum@web.de

22 - 25: 92a Germana Esperanto-Kongreso en Hameln, Germanio. Karulo, kie do estas la infanoj? En la jaro 1284 je tago de Johano kaj Paŭlo buntvestita viro delogis 130 hamelenajn infanojn el la urbo. Ili malaperis en monto kaj neniam plu estis reviditaj. Ankoraŭ hodiaŭ tiu mistera legendo tiras vizitantojn el la tuta mondo al Hameleno. En la jaro 2015 je la Pentekosta semajnfino ni klopodas allogi almenaŭ 130 Esperanto-parolantojn en la urbon. La sentimulojn atendas diversaj programeroj pri la temo fabeloj, rakontoj kaj legendoj. Legendo kaj lingvo

allogas, estas nia kongresmoto. Krome atendas ilin belegaj koncertoj, teatraĵoj, prelegoj, diservoj kaj fakkunsidoj. Inf.: Heinz W. Sprick, Schmiedeecke 2, DE-31840 Hessisch Oldendorf, Germanio. Rete: gek2015@esperanto.de

24 - 26: Internacia Muzika Festivalo en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo, Germanio. Dum la tradicia popolfesto en Herzberg eblos partopreni kaj prezenti Esperanton en la pentekosta urba festo. Ni organizos muzikfestivalon kaj internacian balon. La evento estos internacia renkontiĝo enkadre de Grundtvig-projekto. Inf.: Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, Germanio, esperanto-zentrum@web.de

„damit wir klug werden“

– das ist die Losung des 35. Deutschen Evangelischen Kirchentages, der vom 3. – 7. Juni in Stuttgart stattfindet. Erwartet werden dort mehr als 100.000 Teilnemer.

Sie wollen miteinander ins Gespräch kommen, sich von den Ideen und Darstellungen der anderen inspirieren lassen und Fragen nachgehen wie: „Was müssen wir tun, damit wir klug werden? Wie können wir unsere Begabungen nutzen, um gemeinsam klug zu werden?“

Kirchentage leben von der Teilhabe und der Buntheit der Teilnehmenden. Menschen aus ganz Europa, aus aller Welt, unterschiedlicher Konfession und Religion sind herzlich eingeladen, ihre Arbeit kreativ darzustellen, von ihren Projekten und Anliegen zu erzählen und sich dabei mit Gleichgesinnten zu vernetzen. Das geschieht hauptsächlich auf dem „Markt der Möglichkeiten“. Mit ihm bietet der Kirchentag eine der größten Plattformen zur Kommunikation zivilgesellschaftlicher Initiativen, Organisationen und Einrichtungen mit kirchlichem oder gesellschaftlichem Hintergrund,

Die Deutsche Sektion von KELI, der „Kristana Esperantista Ligo Internacia“ sieht sich in der Pflicht, diese Plattform zu nutzen, über Esperanto zu informieren und für Esperanto zu werben. KELI wird dazu einen Stand auf dem „Markt der Möglichkeiten“ gestalten. Zur Mitarbeit am Stand sind in erster Linie die Esperantosprecher der Umgebung eingeladen. (Mitgliedschaft bei KELI ist nicht Voraussetzung.). Interessierte melden sich bitte bei

Hedwig Fischer
Gustav-Adolf-Str. 2a
48356 Nordwalde
Tel.: 02573-626
<hetifisch@gmail.com>





deutsche
esperanto
Jugend



fiere prezentas

la internacian junularan kongreson



aliĝu ĉe:
ijk2015.tejo.org

temo:

Tutmonda Justeco

loko:

Wiesbaden, Germanio

dato:

02.-09.08.2015 (tuj post la UK!)